

Leterkesto

Claude Gacond, 194-a radioprelego, 1967.06.28 & 1967.07.01

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Paŭzo post nia prelegaro pri la historio de nia movado donas momenton por respondi al la salutoj de niaj geaŭdantoj. Iliaj vortetoj estas al ni agrablaj vivsignoj, kiuj iom post iom permesas al ni desegni mapon pri la aŭdado de niaj elsendoj.

A.- Ni formas grandan familion, kiu vere havas pensunuecon malgraŭ la kilometroj, kiuj nin disigas. Certe vi havos intereson scii, kie sin trovas niaj fidelaj geaŭdantoj.

Cl.- Sinjoro Giovanni Bissaldi en Bolzano, Italio, rimarkis niajn gramatikajn klarigojn pri la uzo de la at- kaj it-participoj. Ni povas akcepti la konkludon de lia mesaĝo :

A.- « *Se la ago esprimita pasive estas tiel fulma, ke ĝi ne havas tempodaŭron, oni ne povas uzi la formon **ata**.* »

Cl.- En tiu sama letero sinjoro Bissaldi iom mokas pri la svisoj, kiuj ne ankoraŭ kapablis doni al siaj edzinoj la civitanan egalecon.

A.- Li tamen sciu, ke en kvar kantoj la virinoj ricevis la voĉdonrajton. Loĝante en unu el ili mi voĉas regule por la komunumaj kaj kantonaj aferoj, kaj partoprenas kiel elektitino la debatojn de nia komunuma decidpova konsilantaro.

Cl.- Tiuj kantoj estas Neuchâtel, kie ni loĝas, Vaud, Genève kaj Basel-land. La svisoj ne estas rapidemaj en la sociaj reformoj. Tamen trankvile ili komprenas la neceson evolui.

A.- Sinjoro Gerhard Kunze en Wittlensweiler, Okcidenta Germanio, ŝatus aŭdi anoncojn kaj raportojn pri la kongresoj de Sennacieca Asocio Tutmonda, kies membro li estas. En la mallonga tempo, kiu estas je nia dispono por niaj esperantaj elsendoj bedaŭrinde ne estas eble konkurenci la gazetaron per raportoj pri la aktualeco.

Cl.- Ni ne loĝas en Bern, kie troviĝas nia radio-studio, sed en montara vilaĝo. Pro tio ni registras nur pounufoje monate niajn prelegojn. Tio malhelpas ĉian temon, kiu tuŝas la aktualecon. Kaj ni pensas, ke nia rolo ne estas refari, kion ceteraj radioj aŭ gazetoj jam faras, sed pritrakti temojn, kiuj estas iom forgesataj.

A.- Cetere ni aktive kunlaboras kun SAT. Niaj prelegoj pri la historio de nia lingvo ekzemple komencis aperi en *Sennaciulo* ekde aprilo 1967. Tiuj, kiuj skribis, por scii, ĉu estas eble ricevi la tekston de niaj elsendoj, povas do sin turni al la redakcio de *Sennaciulo* por ricevi tiun organon.

Cl.- Tiun ĉi someron la SAT-anaro kongresos en Malmö, Svedio, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. Kiam en la kunsidoj de tiu manifestacio oni tuŝos la objekton esperantaj radio-elsendoj, oni tiam memoru, ke la longeco de la esperantaj elsendoj kaj ilia nombro estas iel proporciaj al la interesiĝo de la esperantistaro. Nur per sendo de vivsignoj : leteroj aŭ poŝtkartoj, la esperantistoj povas pruvi sian ekziston al la radio-studioj.

A.- Sinjoro Hans Breitenbach en Berlin raportas pri alia kongreso. La esperantistaj blinduloj renkontiĝos dum la du unuaj semajnoj de aŭgusto en Rheinbreitbach apud Köln.

Cl.- Niaj radio-prelegoj estas sendataj post la disaŭdiga uzo al blindula sonbenda servo. Kelkfoje dum diskuto ni ricevas informeton pri la funkciado de tiu servo. Kvazaŭ neniam ni ricevas vivsignon de blindulo ligita al nia radio per la sonbenda gazeto. Pro tio ni ne konas la dezirojn kaj ŝatojn de la blindularo.

Leterkesto

Claude Gacond, 194-a radioprelego, 1967.06.28 & 1967.07.01

A.- Sinjoro Günter Conrad en München, Okcidenta Germanio, bedaŭras pri la malfruiĝo de niaj vesperaj elsendoj. Ni komprenas lin, ĉar vespere estas agrable enlitiĝi. Tamen en multaj leteroj geaŭdantoj esprimis kontraŭe sian kontenton pri tiu ŝanĝo.

Cl.- Tiu germana samideano interesiĝis pri nia raporto pri la terminologiaj malfacilaĵoj sur la internacia medicina kampo. Same skribis pri tiu temo sinjoro Harri Holmes en London, Britio.

A.- El tiu urbo salutas sinjoro F. Blunden. Sinjoro B. Najbaro en Keighley, Britio, aŭskultis kun miro pri la disputoj okazintaj en la komenco de la disvolviĝo de esperanto. Li neniam sentis bezonon al reformo de nia lingvo.

Cl.- Tio nun estas normala sento. Ni konsideras esperanton kiel vivantan lingvon. En 1887 ĝi ankoraŭ estis nur projekto proponata al la studo de la publiko.

A.- Por pli facile kapti niajn elsendojn, kiujn li aŭdas regule kun familianoj, sinjoro Najbaro instaligis antenon kaj terdraton. Ni mencias tiun ekzemplan al tiuj, kiuj plendas pri malfacila kaptado de niaj elsendoj. Malfortaj ne estas niaj ondoj, sed la kapablo ilin kapti de multaj radio-aparatoj.

Cl.- Partopreno al universala kongreso estas por esperantistoj ĉiam granda evento. Multaj bedaŭros ne povi renkontiĝi en Tel-Aviv, sed ĉiuj ĝojas, ke ĉijare kongreso tamen okazos. Rotterdam sin pretigas por ricevi la esperantistojn de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto.

A.- Sinjoro Jiri Patera en Most, Ĉeĥoslovakio, skribis al ni, kion simbolis por li la universala kongreso en Budapeŝto. Tiu teksto ŝajnas leginda :

Cl.- « *Ĝi estis mia unua Universala Kongreso. Mi antaŭĝojis je tio, mi esperis, ke mi aŭdos tie multon novan, ke mi renkontiĝos kun miaj amikoj, ke mi enĉerpos multajn novajn fortojn por mia poresperanta agado, simple dirite, ĝi estis por mi vere historia evento.* »

A.- Verŝajne inter vi, karaj geaŭdantoj, multaj sin pretigas travivi por la unua fojo aŭ refoje similan eventon partoprenante unu el la multnombraj esperantaj kongresoj. Ni deziras al vi agrablajn travivaĵojn.

Cl.- Fraŭlino Hélène Chavan en Lausanne, Svislando, pasintjare ne hezitis kunpreni sian transistoron por kapti niajn elsendojn el la insulo Sardinio. Aliaj aŭdantoj eĉ skribis, ke dum ferioj ili fine trovas la tempon nin aŭskulti. Por aliaj la ferioj signifas rompon kun niaj ondoj.

A.- Al ĉiuj, kiuj havos la ĝojon ferii, ni deziras agrablajn libertempojn, ĉu kun aŭ sen transistoro.

Cl.- Ni daŭrigos nian babiladon kun niaj geaŭdantoj la venontan semajnon. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-